

LA LANTERNISTO

Venas Majsi
 ĉe l'krepusko
 de la tago agonias,
 kaj sub fenestreto mia
 li per ŝtupetar' lumigas
 la lanternon,
 dolĉigante noktkonsternon.

Ĉiutage
 Malpliigās korposano,
 sed karula Poezio,

mia noktkompaniono,
 grimpas mian ŝtupetaron
 ĉe la koro
 por lumigi lantermeton:
 la mildigo de l'malĝojo
 ĝis la fin' de l'vivovojo.

Ve, se, por lumigi straton
 mian, Majsi ne venadas;
 kaj ve, se la Poezio
 mian koron ne invadas!

Maqluba għall-Esperanto minn
 KARMENU MALLIA

21.iv.65

N.B. Din it-traduzzjoni hadet it-tieni premju fil-Konkurs ta' traduzzjonijiet għall-Esperanto, imniedi fl-1966 mill-'Universala Esperanto-Asocio'.

LA BOVO

~~Ligita, katenita,
 La bovo penrespiris;
 Luktante kaj lacege
 Li fine enen iris.
 Kaj ekflarinte korte la odoron:
 Evidentiĝo de l'versado sanga,
 La bovo ekteruris la buĉejon
 Per sia bleko stranga.
 Kaj, kiam la ĉirkaŭo postsilentis,
 La bovo ekdormiĝis
 Ĉar laca li sin sentis.
 Li revis pri vasta kampar' verdeca,
 Kie brutar' paŝtigās ĉiuspeca,~~

~~Kaj tutkontenta sub la suno krea
 Hufpremis sakojn da furag' ĉiea;
 Ĝis kiam el la dorma ripozemo
 Lin vekis de l'buĉisto piedpremo.
 Kaj, kiam bruis per babil' la korto,
 La bovo tuj eksciis,
 Ke lin apudis de la mort' la sorto.
 Tiom malgajan kaptis lin ektimo,
 Kiom sklava de l'sort' iĝas animo.
 Tiam, sentinte en la korpon iri
 La sangigantan buĉilegon, tial
 Li mildrigardis mortiganton sian
 Kvazaŭ por demandeti: 'Kial, Kial?'~~

20.iv.65

Maqluba għall-Esperanto min
 KARMENU MALLIA

N.B. Din it-traduzzjoni hadet it-tielet premju fil-Konkurs ta' traduzzjonijiet għall-Esperanto, imniedi fl-1966 mill-'Universala Esperanto-Asocio'.